# NAJBARA FOLIO

Redaktas kaj eldonas Klubo de Esperantistoj en Krzeszowice n-ro 6/2000

## SOJLE DE...

Ĉu oni povas sojle de dudekunua jarcento kontraustarigi al la totala tendenco kaj ne sumigi niajn ĝisnunajn atingojn, sukcesojn kaj kompreneble neglektojn kaj neplenumitajn taskojn? Certe ni ne evitos la konsciencesploron. Ni komencu tamen de bonaj aferoj. Nia „rondo familia" en Krzeszowice kalkulas 10 membrojn aktive partoprenantaj en ĉiuvendredaj renkontiĝoj. Feliĉe, klubaj renkontoj, dank' al la direkcio de la komuna kulturcentro okazadas en komfortaj kondiĉoj en la galerio KOK.

Ni havas malantaŭ ni tri jarojn de seninterrompa agado. Certe al niaj avantaĝoj apartenas jam tradiciaj forveturoj al Baltiaj Esperanto Tagoj okazantaj sekve en Litovio, Latvio kaj Estonio. Ankaŭ ni fieras pro ĉeestado en lauvicaj U. K – Montpeliero kaj Berlino. Neniu bedaŭrinde sukcesis partopreni la Kongreson en Tel Avivo. Ĉi tiun evidentan malprofiton ni parte regajnis invitinte S-aninon Renata Wolska, kiu ege interese prelegis al ni pri siaj aventuroj en Izraelo. Ankaŭ forveturoj al Ĉebalta Esperanta Printempo en Mielno, al Kongreso de Fervojistoj Esperantistoj en Siedlce kaj al GRUPE en Gliwice proksimiĝis al ni la valorajn imprezojn.

Ni povis gastigi ankaŭ eksterlandulojn. La internacia lingvo montris plene sian taŭgecon en babiladoj kun koreano, svedino, la franca paro. Tamen ĝisnunaj internaciaj rilatoj ne kontentigas nin. Ĝis hodiaŭ ni ne scipovis trovi rimedon al internaciaj kontaktoj. Korespondado lamas, lingvoscio ankaŭ lasas multe por deziri. Eble deklaro al „Pasporta Servo" ion ŝanĝos? Aŭ enskribo al „Korespondа Servo Mondskala"? La problemo estas serioza, ĉu ni solvos ĝin?

Nia klubo estas filio de Krakova Societo Esperanto. La reciprokaj rilatoj inter ni kaj krakovanoj akomodiĝas amike kaj por ke profundigu ilin, de tempo al tempo ni gastigas la krakovajn geklubanojn. La neforgesebla por ni estis aŭtuna, amika renkontigo , kiun ĉeestis 19 personojn. Ni planas jam printempan renkontiĝon, kiun ni dediĉos al vegetarismo. Certe ne mankos vegetarajn frandaĵojn.

Ĉi tiun numeron ni donas al la partoprenantoj de XVIII Esperantaj Tagoj de Krakovo en kiuj niaj geklubanoj, inkluzive la kvinpersonan koruseton de niaj sinjorinoj, intencas aktive ĉeesti.

## KRONIKO

14.08. Vizitis nin Isabelle Payet kaj Patrick Mange el Francio.
27.08. Okazis XX Pilgrimo Szyndzielnia – Szczyrk. Partoprenis pli ol 60 personoj el diversaj lokoj; Bielsko-Biała, Katowice, Kraków,Krzeszowice, Opole, Zakopane.
22.09. Elżbieta Haręźlak parolis pri katolika E-Movado.
22-24.09. Okazis XVI Kongreso de Polaj Esperantistaj Fervojistoj en Siedlce. Partoprenis 51 personoj. Raportis pri ĝi s-ano Zbigniew Duda.
13.10. Renata Wolska parolis pri impresoj el UK en Tel Avivo kaj aventuroj en Izraelo.
21.10. Okazis amika renkonto kun krakovaj gesamideanoj. La agrablan vesperon ĉe brullignaro kronis komuna kantado kun ĉeesto de Jadzia Dzięgielewska.
10-12.11. Ni ĉeestis en GRUPE 4 en Gliwice. En E-konkurso la unuan premion gajnis s-ano Andrzej Kołpanowicz. Inter valoraj aĵoj troviĝis ankaŭ la jarabono de „Eventoj". Ĉu kune kun „Wydarzenia" baldaŭ montriĝos.

# LA 23-a ĈEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO

Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin organizas en tagoj 1–10 de junio 2001j. la 23-an ĈE-BALTAN ESPERANTISTAN PRINTEMPON kun riĉa E-PROGRAMO kaj aktiva ripozado ĉe la maro.Tiu ĉi internacia E-aranĝo okazos en la atrakcia kaj ĉarmoplena ripozloko MIELNO, pitoreske situanta inter Balta Maro kaj Jamno Lago.

La programo de la ĈEP antaŭvidas interesajn prelegojn kun E-video filmoj, konkursojn kun valoraj premioj, ekskursojn al vizitindaj urboj, ĉiutagan lingvoperfektigadon kaj kantadon. Esperantistoj el diversaj landoj havos okazon prezenti propran programon, en kadro de naciaj vesperoj. La ripozcentro, konsistanta el 5 duetaĝaj domoj kun sunterasoj, estas ĉirkabarita kaj garantias al aŭtoposedantoj sekuran aŭtoparkon. Ĝi situas c. 150m de Jamno – lago kaj 60 m de la strando. Loĝado en dulitaj, bone ekipitaj ĉambroj kun propraj lavujoj. En ĉiu etaĝo troviĝas duŝejoj, eblas sauni. Dum ĈEP – aranĝo la ripozcentro estos okupata nur de esperantistoj. Surloke troviĝas belega manĝejo, kunvenejo, bilardejo, diskejo, bufedo kaj florornamita korto kun multaj sidlokoj. Partoprenkotizo inkluzivas oportunan loĝadon, tri bongustajn manĝaĵojn potage, kongresajn materialojn kaj riĉan programon.

Adreso: 76-032 MIELNO, str. Mickiewicza 3, tel. 3189-539.
Partoprenkotizo varias depende de aliĝtempo kaj egalas al: 600 gis 640 polaj zlotoj
Orienteŭropanoj: 150 ĝis 160 USD
Ceteraj landoj: 220 ĝis 230 USD

Ĉiuj aliĝantoj el Pollando devas ĝiri antaŭpagon de 50 PLN en la bankokonton de Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin. PKO I Oddz. Miejski Koszalin, N-ro 10202791-1906-270-1.

# ANTIKVAĴEJO

**Antaŭ 110 jaroj** – la 8-an de septembro mortis unu el la plej fervoraj adeptoj de la lingvo internacia- Leopold Einstein. En aŭgusto 1888 Einstein ricevis la Unuan kaj la Duan Libron de Dro Z. En kelkaj tagoj li ellernis nian lingvon kaj tuj komencis energian kaj fortan propagandon en la tuta Germanio. Zamenhof opiniis, ke la nomo de Einstein devas esti enskribata per oraj literoj en historio de Esperanto. Lia mallonga sed gravega laboro alportis baldaŭ vere neatenditan rezulton. En Nurnbergo, en decembro 1888, la grava, germana volapukista societo, kies membro estis Einstein decidis aliĝi al Esperanto. Tiu societo fariĝis do, la unua Esperantista grupo. Baldaŭ la societo komencis eldoni la unuan Esperantan gazeton.

**Antaŭ 100 jaroj** – internacia lingvo estis ankoraŭ tre malofte parolata. Ĝi funkciadis antaŭ ĉio kiel lingvo skribata kaj legata. Unuaj internaciaj paroladoj okazis en Francio donante al parolantoj veran plezuron kaj instigante aliajn al similaj kontaktoj.

**Antaŭ 75 jaroj** – nia brava s-ano Maksymilian Ziomek prelegis la 13-an de decembro 1925 en la Jagelona Universitato. La prelego, „Esperanto kaj ĝies nuntempa signifo" kaŭzis, ke reaktiviĝis ankaŭ la krakova, universitata medio.

**Antaŭ 50 jaroj** – la pariza, 35-a UK ne nur abundis je diverstemaj, fakaj kunsidoj sed menciinda estis pro grandioza balo en luksaj salonoj de Hotelo Continental kaj kabareda same kiel varietea vesperoj. Ekzemple, la grupo de belaspektaj kaj pitoreske vestitaj gejunuloj el sveda urbo Skara popoldancis en plej ĉarma maniero mirigante la publikon. Ankaŭ komuna ekskurso al Versailles, malgraŭ griza nubo kaj pluvo tre impresis la delegitaron akceptitan oficiale de la urbestro s-ro Mignot.

**Antaŭ 25 jaroj** – la 16-an de oktobro mortis s-ano Jan Zawada, eminenta aganto de la pola E- movado, eksa prezidanto de PEA.

Lucien Giloteaux el Francio, gajninto de la ĉef-premio de la E-sekcio de Pola Radio, vizitante nian landon, notis diversajn impresojn. En Krakovo ekmiris lin interalie ĉevalveturiloj en stratoj, trumpetisto ludanta ĉiuhoran signalon, surstrataj vendistoj de akvo kun suko, esperantaj eldonaĵoj en librejaj vitroŝrankoj. Surprizis lin ankaŭ misteroj de kurzoj de fremda valuto: oficialaj, hotelaj, PKO kaj tn. „nigraj". Li rimarkis ankaŭ, ke en hoteloj kaj ekster ili atendas publikulinoj. Kiel facile rimarki, post 25 jaroj restis nur trumpetisto kaj fama signalo.